
nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2026

PLIAMPLEKSIĜIS LA PERIODO POR LA KURSO DE UNED

La Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) anoncis la plilongigon de la enskribiĝo en la kursoj de lingvoj, inklude de la Esperanto-kursoj, en la niveloj A2 (por komencantoj), B1 kaj B2. La nova dato finiĝas tre baldaŭ, la 4-an de novembro, do rapidu por aliĝi aŭ por informi eblajn interesatojn.

Memoru ke la anoj de Hispana Esperanto-Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo, tiom, ke oni eĉ ŝparas pli ol la kvanto de la jara kotizo.



Krome, memoru ke Madrida Esperanto-Liceo proponas stipendiojn por loĝantoj en la madrida regiono; vidu la detalojn en tiu ĉi ligilo: https://mel.esperanto.es/index.php/67-becas-stipendioj-esperanto-uned-2026. Ankaŭ la valencia grupo proponas stipendiojn, ne nur en sia regiono, sed ankaŭ por junuloj ie ajn en Hispanio; bv kontroli ĉe ilia retejo https://valencia.esperanto.es/.

Bonvolu diskonigi, por kreskigi la nombron de lernantoj, kio ebligos la daŭrigon en venontaj jaroj. Indas diskonigi ankaŭ inter homoj ekster Hispanio, ĉar UNED havas sidejojn en aliaj landoj, kaj por la niveloj B1 kaj B2 eĉ ne necesas koni la hispanan, ĉar la instruado okazas rekte en Esperanto.

Vidu detalojn ĉe: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

KOMENCIĜIS ĈEESTA KURSO

Kiel anoncite en pasinta numero, la 20-an de oktobro komenciĝis nova ĉeesta kurso de Esperanto por komencantoj en Madrido, konkrete en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo. Partoprenas 6 tre entuziasmaj lernantoj.

VIRTUALA KAJ ĈEESTAJ KONGRESOJ DE UEA

Inter la 26-a ĝis 29-a de novembro 2026 okazos la 7-a Virtuala Kongreso de Esperanto, organizata de Universala Esperanto-Asocio. La baza temo de la programo estas: “Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo”.

La Virtuala Kongreso (VK) estas senpaga por individuaj membroj (IM) de UEA, kiuj aliĝos al ĝi ĝis la 15-a de novembro 2026. Se vi ankoraŭ ne estas membro, eblas samtempe aliĝi al UEA kaj al la VK per la sama formularo. Vidu la detalojn kaj aliĝu ĉe la adreso: https://vk.esperanto.net/2026/.

Memoru ankaŭ ke la venonta Universala Kongreso okazos en Melburno (Aŭstralio), komence de julio. Atentu la rabatitan kotizon ĝis la fino de novembro, kaj aliĝu ĉe: https://uk.esperanto.net/2027/.

La Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos venontjare inter la 15 kaj 22 de aŭgusto 2027 en Germanio, konkrete en la urbo Petzow, proksime al Potsdamo kaj Berlino. La kongresejo situas sur duoninsulo ĉe la lago Glindower See kaj disponas pri propra plaĝo, diversaj loĝeblecoj kaj subĉiela scenejo. Legu detalojn ĉe: https://ijk2027.tejo.org/.

nia voĉo **novembro 2026**

HISPANA KONGRESO EN HERRERA DEL DUQUE EN 2027



Jam 60 homoj aliĝis ĝis nun al la 85-a Hispana Kongreso de Esperanto, eĉ se mankas ankoraŭ 11 monatoj. Memoru la la loko estos la ekstremadura urbo Herrera del Duque, kaj la datoj de la 1-a ĝis la 3-a de oktobro 2027. Ni planas organizi antaŭkongreson en Madrido, por ke ĉefe eksterlandanoj povu profiti la okazon kaj por organizi komunan vojaĝon al la kongresurbo.

Oni povas trovi la unuajn bazajn informojn, la aliĝilon kaj la liston de ĝisnunaj aliĝintoj en la retadreso https://kongreso.esperanto.es/.

Aliĝu jam kaj profitu la rabatitan kotizon por frua enskribiĝo.

ARTIKOLO PRI HISTORIA TOMBEJO

En retejo de asocio rilata al la historia civila (sekulara) tombejo de Madrido aperis interesa artikolo pri la tombo de Amelia kaj Marina Mangada. Ili estis la filinoj de la historia esperantisto Julio Mangada, kaj forpasis en tragikaj cirkonstancoj en la 1930-aj jaroj.

La artikolo troviĝas, kun ĉeftitolo "La eĥo de Esperanto sub la ŝtono", en tiu ĉi adreso: https://mallonge.net/ameliakajmarina.

Post kontakto kun la aŭtoro montriĝis ke liaj avo kaj patro (resp. Ricardo kaj Fernando Jara) estis mem esperantistoj.

Ni nun esploras la eblecon organizi komunan viziton al la tombejo de la Almudena, por viziti tiun tombon kaj aliajn de esperantistoj. Se vi estas interesata, kontaktu kun Liceo. Ni informos pri la planoj, se ili fine konkretiĝas.

PROGRAMITAJ RENKONTIĜOJ

La kutima sabata kunveno okazos la unuan sabaton, tio estas la 7-an de novembro, je la 18:30, kiel ĉiam ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2. Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.

Aparte de la anoncitaj eventoj, la sidejo malfermiĝos ĉiujn lundojn, post la 18,30, kiel tradicie. Ĉiuj estas invitataj, por interparoli kaj plani novajn agadojn.

PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Vi povas trovi nin ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com